KER-AGENDO

I. Preparfazo

Periodo de 60 tagoj ĝis 22 tagoj antaŭ la sesio

1. *Je 60 tagoj la ekzamentago*

   Vi devas anonci vian intencon organizi sesion kaj plenigi la retan aliĝformularon. http://edukado.net/ekzamenoj/formularo
   La sesio estos aprobita kiam la minimume necesaj datumoj estos indikitaj en la formularo. Tiam via sesio ekhavos kodon, kreiĝos por ĝi aliĝilo kaj povas komenciĝi la varbado.

2. *Je 50 tagoj antaŭ la sesio*

   Necesas ke ĉiuj devigaj ĉeloj de la reta formularo estu plenigitaj.
   Necesas ĉeforganizanto, dua organizanto kaj gvidanto/honora gasto por la sesio.
   Se pro iu kialo la ĉeforganizanto kaj la dua organizanto estas la samaj personoj, bv indiki la saman nomon kun ĉiuj datumoj ambaŭ fojojn.

   Ni aparte mencias, ke la ĉeforganzianto aŭ la organizanto rajtas mem ekzameniĝi, sed tiuokaze li/ŝi aktivu nur en la preparlaboroj kaj neniun taskon li/ŝi havu dum la ekzamentago nek post la ekzameno (ekz. rilate la kopiadon kaj alpoŝtigon de la testoj, la gardadon de la kopioj).

   En kazo, kiam unu el la organizantoj mem ekzameniĝas, nepre necesas, ke estu GVIDANTO, kaj tiu estu laŭeble ekstermovadulo, por ke estu klare pruvebla la pureco de la ekzameno.
   En la reto troveblas la **sindevig-formularoj, kiujn necesas plenigi, subskribi** kaj resendi/alŝuti ilin.

3. *Je 21 tagoj antaŭ la ekzameno*

   necesas, ke kunestu la minimuma nombro de la kandidatoj.
   <u>En kazo de tutmonda ekzamentago</u>
   tiu nombro estas **nur 5 personoj** kunvenintaj por ajnaj niveloj.
   <u>En kazo de aparta, memstara ekzamentago</u> (ne-tutmonda)
   tiu minimuma nombro **devas esti 10 el unu de la nivelo**j. Por tiu kvanto aldoneblas kiom ajn alinivelaj kandidatoj.
   Ekz. eblas 10 por C1, kaj 2 por B2 kaj 1 por B1-niveloj,
   sed ne eblas 8 por C1 kaj 8, por B2 kaj 2 por B1.
   Se la necesa nombro de kandidatoj ne aliĝas ĝis la limdato, la komisiono povas nuligi la sesion.

   Vi povas pluiri al la sekva fazo nur post la plenumo de ĉiuj supraj punktoj.

   Dankon pro via laboro, Katalin Kovats, organizanto